
# *Díaz-Canel okazigis renkonti?on kun membroj de la kuba misio en Grenado*




Sankta Georgo, dec 8 (RHK) La prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel Bermúdez, renkonti?is kun membroj de la kuba ?tata misio kaj la solidarecaj organiza?oj de Grenado.

Niaj plej proksimaj, plej indaj kaj plej kura?aj amikoj estas la popoloj de Karibio, Díaz-Canel rememoris ?i tiun esencan frazon de ?efkomandanto Fidel Castro Ruz pri la fortaj ligoj de la karibaj popoloj, resuminte la renkonti?on.

Nuntempe en Grenado kunlaboras medicinaj kaj konstrubrigadoj. Estas preska? kvindek profesiuloj, kiujn Díaz-Canel dankis pro ilia subteno, nome de Kubo, por la progresigo de la programoj de la Granada registaro.

Ni ?ojas trovi tiom da korinklino kaj rekono de niaj karibaj fratinoj kaj fratoj al Kubo kaj la Revolucio," li diris; Plenigas nin de emocio, ke vi diras al ni, ke ni ?iam povas kalkuli je vi por la defendo de Kubo; ni

?ojas, ke en la registaro de ?efministro Dickon Mitchell estas tri ministroj, kiuj studis universitatajn diplomojn en Kubo.

Anka? membras la kuban  delegacion  la prezidanto de firmao Biocubafarma, Eduardo Martínez Díaz; vicministro pri eksteraj aferoj Josefina Vidal Ferreiro; kaj Eugenio Martínez Enrique, ?enerala direktoro de Latin-Ameriko kaj Karibio de la Ekstera Ministerio, inter aliaj personecoj.

Vidu pli ?e:https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/306999-prezidento-de-kubo-vizitis-modernan-medicinan-centron-en-sankta-vincento-kaj-grenadinoj

:Fonto: Retejo de la prezidanteco

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/307395-diaz-canel-okazigis-renkontigon-kun-membroj-de-la-kuba-misio-en-grenado

**Radio Habana Cuba**